Leteron el Svedujo, de membro de la Sveda Ruĝa Kruco, ni ricevis en Julio. Ni legis la jenajn vortojn: "En Koreo mi ĉiam spertis plenan komplezon de Usonaj soldatoj, junaj kaj maljunaj – viroj, kiuj havis kaj havas pli da riska laboro ol ni Svedoj. Simple, nefanfarone ili ĉiam konduktis al ni tre ĝentile. Nekalkuleblaj estas la fojoj, kiam mi vidis amikan agmanieron de Usonaj viroj kaj virinoj en Koreo kaj Japanujo. Pro tio mi ĉimaniere deziras danki ĉiujn amerikanojn. Vi – popolo de Ameriko – en viaj hejmoj – povas esti certa, ke viaj geparencoj, edzoj, filoj, frat-oj, estas bonaj ambasadoroj en eksterlando. Dankeme, *F. Jobansson*."

S-ro Sergio Docal, Washington, D. C., raportis en Julio, ke li komencis Esperanto-kurson por kunlaborantoj en sia oficejo.

En televida programo de Stacio KVTV, Sioux City, Iowa, la 15-an de Septembro, *Ges-roj G. Alan Connor* klarigis pri Esperanto. La intervjuon aranĝis *Joe Schneiders*, kiu unue interesigis pri Esperanto kaj pri lingvoj ĝenerale pro siaj spertoj en Koreo, kiam li estis soldato.

En klubo "Kiwani", Newport, Washington, la 4-an de Septembro, *Pastro R. W. Mason* aranĝis demonstracion de Esperanto, prezentita de *Ges-roj G. Alan Connor*, kiuj tiutempe vizitis la urbeton. Aperis du artikoloj pri la afero en la tagĵurnalo, kaj *Pastro Mason* intencas organizi Esperanto-kurson.

Esperanta Stacio W3UOD estas la nomo de nova amatora radio-stacio de *Donald Munro*, Quakertown, Pa. Sur speciala respond-karto (Q.S.L.), *S-ro Munro* presis la nomon kaj numeron de sia stacio kaj ankaŭ la adreŝon de EANA, al kiu oni povas sendi informpetojn pri Esperanto.

ESPERANTISTA VOJAĜO TRA EŬROPO

D-ro William Solzbacher

EN PARIS malnova palaco proksima al la Stela Placo (*Place de l'Etoile*), kie troviĝas la fama Triumfarko kaj la same fama Tombo de la Nekonata Soldato, estas la provizora sidejo de UNESCO. Mi vizitis ĝin unuafoje meze de Julio, kaj baldaŭ trovis min en la oficejo de D-ro Herbert W. Schneider, Estro de la Divizio de Internacia Kultura Kunlaboro kaj estinta profesoro de Columbia-Universitato en New York. Je la pordo mi renkontis S-ron Pierre Lebar, oficiston de la sama Divizio, kun kiu mi estis korespondinta pri aferoj koncernantaj la Esperanto-Pet-skribon. Profesoro Schneider esprimis kontentecon pri la fakto, ke S-ro Lebar estos sendata al la Universala Esperanto-Kongreso en Zagreb kiel UNESCO-observanto, kaj mi gratulis la estrojn de UNESCO kaj la Esperanto-movadon je tiu decido.

Mi ankaŭ havis la plezuron konatiĝi kun la Direktoro de la Eduka Departemento de UNESCO, S-ro Lionel Elvin, al kiu ni ŝuldas grandan dankon kiel amerikanoj kaj kiel Esperantistoj: kiel amerikanoj, ĉar li faris multe por konigi usonajn ideojn kaj kulturajn valorojn en Britujo (la fakto, ke li havas usonan edzinon, sendube pligrandigis lian kompetentecon por tiu tasko); kiel Esperantistoj, ĉar li tradukis en Esperanton kvar rakontojn el la Skizlibro de Washington Irving, inter ili "Rip van Winkle".

Ĉiuj UNESCO-oficistoj, kun kiuj mi parolis en Paris, aŭskultis kun intereso miajn rimarkojn pri la EANA-Kongreso en New York, speciale ĝia lasta kunveno, kiu okazis en la Sidejo de la Unuigitaj Nacioj kaj en kiu S-ro S. Arnaldo, Direktoro de la UNESCO-Oficejo en New York, estis unu el la ĉefparolantoj.

Mi gajnis la impreson, ke en la UNESCO-Sidejo oni atente kaj senpartie studas la eblecojn, kiujn prezentas la rezolucio de Decembro 1952 pri la Esperanto-Pet-skribo. La ĉefa laboro tamen devas esti farata en la Naciaj UNESCO-Komisionoj kaj en la delegitaroj, kiujn la 68 Membro-Nacioj sendos al Montevideo en 1954.

MEZE en la nokto, en Bonn, ĉefurbo de Okcidenta Germanujo, mi ĵetis min en la malhelan koridoron de vagonaro de la *Tauern-Express*, vagonaro iranta de Ostende, je la belga marbordo, al Beograd, ĉefurbo de Jugoslavujo. Ĉio estis plena. En la kupeoj kaj koridoroj la kapoj, brakoj kaj kruroj de dormantaj gevojaĝantoj tordiĝis groteske inter valizoj kaj pakajoj, kaj la aero estis tiel dika, ke oni povis tranĉi ĝin. Sed en unu kupeo britaj skoltinoj, kiuj volis fari sian "bonan agon" frue en la mateno (je la kvara!), disŝovis siajn maldikajn korpojn, por malfermi al mi sidlokon, kaj ankaŭ donis al mi la agrablan informon, ke ili ĉiuj elvagoniĝos en Mainz, la venonta halto.

Du horojn poste, kiam la agrabla ĉirpado de la birminghama dialekto malaperis el mia kupeo, envenis unue geedza paro—jugoslava diplomato kun ĉarma edzino—, poste kvar duone dormantaj britaj ge-Esperantistoj, du virinoj kaj du viroj, irantaj kiel mi al la Esperanto-Kongreso en Zagreb. Ili estis membroj de malbonŝanca karavano. La karavanestro kaj la plimulto de liaj geklientoj perdiĝis en Ostende, kaj miaj kvar kunvojaĝantoj pasigis la longajn horojn de Ostende al Mainz inter la va-

lizoj en la koridoro. Unu el ili estis la skota Esperanto-poeto J. Francis.

La diplomato sufiĉe bone sciis la germanan lingvon, kaj lia edzino estis ideala viktimo por miaj provoj praktiki la serbo-kroatan lingvon, kiun mi preskaŭ tute ne uzis dum multaj jaroj. Kiam la diplomato aŭdis, ke mi vizitos Jugoslavujon, li malfermis sian valizon kaj elprenis botelon da *slivovica* (serba plumbrando). Post komuna trinkado ni estis amikoj, kaj li donis al mi multajn utilajn informojn kaj konsilojn. Sed baldaŭ Esperanto fariĝis la ĉefa lingvo parolata en la kupeo, kaj tio multe impresis la diplomaton.

PRESKAU 1700 personoj partoprenis la Universalan Esperanto-Kongreson. La kroata ĉefministro kaj la urbestro faris paroladojn en Esperanto. Diversaj aŭtoritatoj monsubtenis la kongreson. Oni inaŭguris Zamenhof-straton en Zagreb. La poŝto eldonis du Esperanto-poŝtmarkojn por uzo en Jugoslavujo kaj unu por uzo en la jugoslava zono de Trieste. Estis evidente, ke por la Tito-reĝimo la Esperanto-Kongreso, la plej granda internacia kunveno iam okazinta en la lando, estis favora okazo por reklami la politikan sistemon nun tie regantan.

Ĉu la klopodo sukcesis? Tute ne! En personaj konversacioj kun mi preskaŭ nenulaŭdis la komunistan reĝimon, sed multaj kongresanoj, aŭdinte, ke mi estas amerikano, parolis entuziasme pri Usono kaj la demokrataj landoj kaj akre plendis pri la manko de libereco, la sekreta polico, la persekuto de la religio, malaltaj salajroj, altaj prezoj kaj impostoj, kaj cent aliaj suferoj de la jugoslavaj popoloj. Kelkaj faris tion en tre insista kaj drama maniero, kaj pli ol unu fojon mi avertis gesamideanojn, ke ili ne tiel laŭte parolu sur la strato, ĉar ja la UDBA – sekreta polico, pli ofte oni ankoraŭ mencias ĝin per ĝia malnova nomo OZNA – eble ankaŭ havas spionojn, kiuj komprenas Esperanton.

Pro facile kompreneblaj kaŭzoj ne estas oportune, ke mi skribu tro detale pri tio, sed estis tute evidente, ke multaj jugoslavaj Esperantistoj ĉeestis la kongreson, ĉar tio donis al ili okazon por rekte paroli kun vizitantoj el la libera mondo. Por kelkaj el ili tio estis – mi citas leteron ĵus ricevitan el Jugoslavujo – “lumradio en malhela nokto”.

La afableco kaj helpemo de la jugoslavaj Esperantistoj kaj de la tuta loĝantaro de Zagreb al la eksterlandaj kongresanoj estis kortuŝa. Jugoslavujo estas bela lando, kaj la serboj, kroatoj, slovenoj kaj macedonoj estas simpatiaj popoloj, kun fiera historio, koninda kulturo, ĉarmaj popolkostumoj, popolkantoj kaj popoldancoj. La artaj vesperoj kaj kelkaj el la paroladoj en Zagreb tion bone demonstraciis.

PRI la kongreso mem jam aperis longaj raportoj en la Esperanto-revuoj. La aŭstra, aŭstralia, belga, franca, jugoslava, nederlanda, norvega, sveda, kaj svisa registaroj sendis oficialajn reprezentantojn. Ĉeestis observanto de UNESCO. Partoprenis ses usonanoj, inter ili D-ro F. W. Breth kaj S-ro Konrad Kail. Mi mem funkciis kiel Vicprezidanto de la Unua Sekcio (Scienco kaj Tekniko), prezidis kunsidon de la Internacia Komisiono *Esperanto kaj Sociologio*, partoprenis en laboro de komisiono pri UNESCO, kaj ludis mian rolon en publika kunveno de la Akademio de Esperanto, kie oni diskutis kaj iomete disputis pri lingvaj problemoj.

Dum mia nunjara vojaĝo tra 15 landoj mi spertis multajn pruvojn pri la neceseco de neŭtrala interlingvo. Jen eble temo por alia artikolo.



En gazeto "La Calle", Caracas, Venezuelo, aperis longa artikolo en hispana lingvo "Breve Historio del Esperanto". La artikolo estis skribita de nia membro S-ro Manuel Certad Paredes, kiu aktive laboras en la Esperanto-Asocio en Venezuelo. Supre ni presas foton de grupo de Esperantistoj en Caracas, okaze de starigo de nova Esperanto-kurso. En la mezo de la grupo troviĝas S-ro Benito Losada, Prezidanto de la Esperanto-Asocio de Venezuelo. Kun plezuro ni raportas, ke en Julio ĉijare S-ro Losada kaj lia ĉarma filino vizitis la Centran Oficejon de EANA.

Dum radio-programo "Nia Maniero de Vivo", de Stacio WMTR, Morristown, N. J., la 15-an de Septembro, Donald Walton kaj Henry Kruse respondis al demandoj pri Esperanto.

La tagĵurnalo "Worcester Daily Telegram" presis en Julio longan artikolon kun foto pri Wilfred E. L. Todd kaj Esperanto. S-ro Todd, kiu ĵus revenis de la EANA-Kongreso en New York, donis intervjuon pri siaj spertoj kaj tiamaniere bone klarigis pri Esperanto al granda legantaro.

En la grava tagĵurnalo "Hartford Courant", aperis "Letero al la Redaktoro" skribita de Elsie Yunghans, kiu tiutempe libertempis en la ŝtato Connecticut. Rezultis multaj informpetoj al EANA.

Dulingva artikolo, Esperante kaj angle, aperis en la aŭtuna eldono de la gazeto "Reader's Round Table", redaktata de Susan Bond, Chatham, N. J. La artikolo titoliĝis "Kiu Deziras Manĝi de Sur la Planko", kaj venis de la plumo de Connie Davis.

En la ĵurnalo "Winnipeg Tribune", Kanado, aperis "Letero al la Redaktoro" skribita de iu "Chi Valor". Verdire, sub tiu nomo kaŝis sin nia samideano Robert C. Palmer. Denove multaj informpetoj alvenis.

"Ni Provu Esperanton" estas la titolo de redakcia artikolo en la tagĵurnalo "Newark Ledger". La artikolo iom sarkasme aludis la ideon, ke Esperanto povos solvi ĉiujn problemojn de la mondo. Poste, en la sama ĵurnalo J. Henry Kruse enmetis leteron al la redaktoro, kiu klarigis, ke Esperanto ne estas panaceo, sed per helpo de komuna lingvo, saĝaj kaj bonaj homoj eble povos pli bone kunlabori.

LA ASTRONOMO

George H. Perrine

ĈIU havas siajn ĉagrenetojn. La sorto de policano, se ni povas kredi al S-roj Gilbert kaj Sullivan, ne estas feliĉa. Riĉulo zorgas pri sia mono. Fraŭlino mordas la ungojn, pro timo ne kapti edzon. Sinjorino rimarkas, ofte laŭvoĉe, ke ŝia edzo havas kelkajn difektojn. Edzo sopiras al la perdita feliĉo, speciale post la apero de tria mentono ĉe la edzino. Eble Hamleto pravis: tiu ĉi mondo estas maro da ĉagrenoj.

El ĉiuj, kiuj loĝas en tiu ĉi mondo malagrabla, la astronomoj devas sendube esti iomete feliĉaj kaj trankvilaj. Ties interesoj flugas en la spacon; ties mensoj pripensas la stelojn kaj forgesas niajn mondajn ĉagrenojn. Ties revoj estas kosmaj, brile aspergitaj per galaksioj kaj universo.

Ni forlasu, do, la ĉagrenojn de nia mondo. Ni supozu, ke vi estas astronomo.

Kia kariero! Vi pasigas kvardek jarojn, fiksante la nazon kontraŭ la malvarman finon de teleskopoj, kalkulante ekvaciojn tri metrojn longaj, skribante nelegindajn artikolojn pri la duba ĉeesto de nikelo sur la surfaco de Alfa Beta Gamma N-ro 84, aŭ ekzamenante per okuloj akvumigantaj mikroskopan punkteton sur fotografa klišo, nesciante ĉu tiu punkto estas nova universo, ereto de polvo, steio ĝis nun nekonata, aŭ muŝomakuleto. Kaj se, malbonŝance, la planedo Venuso subite eksplodas, ĉu vi mem vidus tiun rimarkindan fenomenon? Tute ne. Aŭ vi estus skribanta viajn malbenitajn artikolojn, aŭ ellaboranta viajn enuigajn ekvaciojn, aŭ, se hazarde, vi vin trovus ĉe via teleskopoj, vi estus sendube rigardanta tute malĝustan parton de la ĉielo. Dume, iu malantaŭdoma neprofesiulo, per teleskopoj farita el peco de tubo, aĉa bierbotelo, kaŭĉukostrio, kaj tri harpingloj, ne nur vidus la fenomenon, sed ankaŭ li ĝin fotografus.

Kiel ajn estu ĉagrena tiu sperto, vi povas (se vi estas vigla) profiti el la okazo por samtempe plibonigi vian reputacion kaj meti tiun neformalan impertinentulon en lian lokon. Vi skribas artikolon dignoplenan, sed iom sarkasman, kvazaŭ vi disciplinus infanon petoleman. Mi povas ĝin vidi nun: "Rilate al raporto de S-ro Felis Domestica (kiu nomo, mi forte suspektas, estas falsa) pri la asertita eksplodo de la planedo Venuso, mi volus firmdiri, ke nek unu observatorio vidis tiun fenomenon. Dum la nokto kiam S-ro Domestica observadis tiun kvartalon de la ĉielo, okazis programo de artfajraĵoj en Upper Wadley, Anglujo; kaj tio, sen ia ajn dubo estis tio, kion vidis nia juna amiko. Plue, mi esperas ke li pardonos min, se mi sugestas, ke rompita bierbotelo ne multe taŭgas kiel teleskopobjektivo. Se li aĉetus Ditzmar-Waldeufel-Hofstaengl-Dumkopf f/0,002 (bonan objektivon kiu kostas nur dek mil dolarojn), mi estas konvinkita ke liaj observoj estus pli ĝustaj. Ke Venuso ne estas videbla de post la nokto de la artfajraĵoj en Upper Wadley estas fakto facile klarigebla. La spaco, kiel ĉiu scias, estas kurba. Ĝi estas ankaŭ iom sulka – fenomeno provebla per la rilato $e^x i^{-u} / \sinh^{-z}$. Tiu planedo nur malaperis malantaŭ la sulketo i^{-u} . Ĝi nepre reaperos, tamen, la 23-an de aprilo 2105, je la oka matene, laŭ Greenwich-tempo."

Post ĉio tio, via reputacio estas firme starigita. Via sulketo-teorio faras vin famega. Kaj pro tio ke neniu kapablas prui, ke via teorio est-

as sensencaĵo, aŭ ke Venuso tute ne reaperos la 23-an de aprilo 2105, via astronoma moŝto fariĝas nerefutebla aŭtoritato. Vi kreskigas barbon, kaj la registaro konstruas por via uzado 2,000,000-dolaran observatorion.

Sed nenia kariero – eĉ la via – estas komplete sendolora. Suneklipso estas okazanta. Ĉe via observatorio, malbonŝance, ĝi estos nur parte videbla. Sekve, vi devas enpaki vastegan kvanton da multekosta ekipaĵaro; varbi armeon da sciencistoj, astronomoj, matematikistoj, fizikistoj, kaj kuiristinoj; ĉarti ŝipeton, kies estro navigacias pli laŭ siaj piedkaloj ol laŭ la kartoj; fine surteriĝi ĉe marbordo tropika, kie ĝoje vin salutas svarmoj da moskitoj, serpentoj, puloj, kaj burokratoj. Post kiam tri fizikistoj kaj unu kuiristino mortas pro berbero kaj vi mem iomete resaniĝas post atako de malario, tiam vi komencas longan, dolorplenan vojaĝon tra la ĵangalo, en akompano de grupo da indiĝenaj portistoj, kies sovaĝaspekta mieno igas vin demandi al vi, ĉu ili ŝatus manĝi torson de astronomo *poche beurre fondu*, aŭ eble senostigitan fizikiston *au jus*.

Fine, turmentata per beleta kombino de leŭkemio, malario, lakso, reŭmatismo, artrito, kaj blenoreo (ĉi tiu infekto estas, kompreneble, neesplikebla), vi alvenas al la piedo de granda monto. Kombante la pulojn el via barbo, vi kunvokas la postvivantajn anojn de via armeo, kaj kune vi ĉiuj komencas suprentreni sur la monto la restaĵojn de via ekipaĵaro. Dum tri longaj semajnoj, vi baraktas, vi grimpas, vi falas, vi tiras, vi glitas. Vi perdas en la neĝo du junajn astronomojn kaj unu multekostan teodoliton, sed malgraŭ tiaj ĉagrenetoj, vi neniam lasas vin esti senkuragiĝita. Kiam vi atingas la supron de la monto, vi ankaŭ perdas kelkajn piedfingrojn pro frostiĝo. Tamen, kiel vi ofte diras, oni devas fari kelkfoje etajn oferaĵojn antaŭ la trono de la Scienco.

Alproksimiĝas la tago de la eklipso. Viaj instrumentoj estas pretaj, viaj teleskopoj zorge lokitaj. La malvarma, klara aero provizas bonegajn vidkondiĉojn. Ĉiunokte kosmaj radioj kuras tien kaj reen laŭ via spino.

Jen la tago! La postvivantaj junaj astronomoj troviĝas ĉe siaj postejoj, la fizikistoj pasie kalkuladas, la matematikistoj kaj la fotografaparato estas ŝarĝitaj (la unuaj per ekvacioj kaj la aliaj per kliŝoj). Ĉio estas preta. Vi ĵetas lastfojan ĉirkaŭrigardon por vin certigi, ke ĉio... Atentu! Du minutoj! Unu minuto kaj duono! Unu minuto! Duono! Dek-kvin sekundojn! Dek ...

Nubeto, ne pli granda ol la mano, vagas malrapide trans la sunon, eklipsante la eklipson. *Ho ve!*

* * *

Jaroj pasas. Via barbo kreskas, kaj ankaŭ via reputacio. Fine, plena de aĝo kaj honoro, vi kunigas la manojn sur la barbo, kaj kuŝigas vin por morti.

"Vi estas tiel saĝega, avo!" flustras via nepino, kiu sidas adorante ĉe via lito. "Vi scias ĉion, ĉu ne? Do, diru al mi, kara avo – de kie venas la infanetoj?"

Vi malfermas la lacajn, eluzitajn okulojn, kaj rigardas tiun amatan knabinecon. Subita larmeto duone blindigas vin. Kia freŝa, juna kreitaĵo! Kiel bela kaj mistera la vivo! "Nu, de kie venas la steloj en la ĉielo? Mi ne scias, karulineto mia."

"Sed, kara avo, se tion vi ne scias, kion vi ja scias?"

"Nenion, etulino. Nenion!"



DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondukuponon); Enlande, unu vorto por du cendoj.

- Argentino.** Enrique R. Gonzalez, Casilla de Correo, 421, *Mendoza*. 18-jara studento dez. interŝ. il. PK kun ĉiuj landoj, precipe kun Usono.
- Brazilo.** Haroldo Silva, Rua Mal. Joaquim Inacio, 40-c/6, *Realengo, Rio de Janeiro*. 25-j. studento, dez. kor. kaj interŝ. PK.
- Ĉekoslovakujo.** Jaroslav Pokorný, Riegrova 299, *Ŝvermov 1*. Dez. interŝ. PM kontraŭ unuataĝaj kovertoj. Skribu Esp., angle aŭ hispane.
- Germanujo.** Josef Barghammer, Unterweikertshofen, (13b) *Post Schwabhausen/Dachau*. 17-j., studento, dez. kor. kaj interŝanĝi PM.
- Hispanujo.** Nicasio Terrasa Pou, Delegacion de Hacienda, *Palma de Mallorca* (Isles Baleares). Dez. interŝ. (por sia nepineto) il. revuojn ĉiumonate kontraŭ hispanaj gazetoj. Serioza persono dezirata.
- Hispanujo.** F-ino Aurora Vilella, Calle Clot 111, bajos, *Barcelona*. 17-j. deziras korespondi kun junulo 18 ĝis 26 jaraĝa.
- Hispanujo.** Petro Fernandez, estr. Ripolles 45 bajos, *Barcelona, L.M.*, 25-jara fraŭlo deziras korespondi, prefere kun fraŭlino.
- Italujo.** Maria Antonietta DeMuro, Via Pincipessa Maria 41, *Sassari*. 19-jara fraŭlino deziras korespondi, interŝanĝi fotojn pri kostumoj.
- Japanujo.** Kozo Yamanishi, Higashi-Koniri 89, Nishihima, *Wakayama-shi*. 29-jara arkitekto deziras kontaktiĝi kun samprofesiuloj tutmonde.
- Kanado.** John Deakos, 314 Second St., *Midland*, Ontario. 16-jara, deziras korespondi kun junuloj prefere de Sud-Ameriko.
- Nov-Zelando.** S. M. Nola, *Oratia*, Auckland. Deziras korespondi kun Usonanoj pri diversaj temoj.
- Portugalujo.** Renato Adolfo Figueira, Rua 9 de Julho 292, *Porto*. 25-jara desegnisto deziras korespondi kun Usonaj geesperantistoj.
- Svedujo.** Frank Johansson, Gotlandsgatan 58 v, *Stockholm S^o*. Deziras korespondi kun samideano en New York aŭ New Jersey.
- Usono.** J. E. Bush, 3700 N. 75 St., *Milwaukee 16*, Wisconsin. 42-jara instruisto deziras korespondi kun alilandaj samideanoj.
- Usono.** Janis A. Lazdins, *Gays Mills*, Wisconsin. Deziras korespondi kun la tuta mondo.
- Usono.** David Schieber, 301 So. Walnut, *Bucyrus*, Ohio. 19-jara, studento deziras korespondi kun Esperantistoj en la tuta mondo. Interesiĝas pri muziko, literaturo kaj poezio. Respondo garantiata.
- Turkujo.** Faik Çakmak, Posta kutusu No. 1, *Keskin*. Deziras korespondi.

10% Discount on All Books to Members of EANA

The Central Office is pleased to announce that henceforth all members of EANA will enjoy 10% discount on ALL books and other items in the catalog purchased from Headquarters. Thus, when you order books in any amount just take 10% off the total sum due. Now is a good time to order those books you may be wanting. This offer of 10% discount will be valid until new catalog is issued, or until further notice. Take advantage of this special privilege to Members of EANA.

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. Here are a few popular and standard items. 10% discount in quantity. Ask about other titles.

PRACTICAL ESPERANTO , Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 pictures to illustrate rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto. 160 pp. illustrated.....	\$.25
REED'S PRACTICAL GRAMMAR , Dr. Ivy K. Reed. A very complete beginner's text for class or self, with extensive examples, dialog, etc. Offset reprint, a few pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with vocabularies and a complete index. Original price 75¢, reduced to less than half-price.....	.35
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE , Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "6-books-in-1": history, textbook, reader, world directory, 2 dictionaries. All in one vol. 245 pp.....	Paper \$1.50; Cloth 3.00
UNIVERSALA ESPERANTO-METODO , Dr. Benson. Encyclopedic all-Esperanto book of 11,000 pictures with textbook, reader, dictionary. 560 pp.....	Cloth 6.00
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY , Cox. A detailed and thorough analysis of Esperanto grammar in English, innumerable examples. 371 pp.....	Cloth 1.50
ESPERANTO (World Language Series) , Prof. Mario A. Pei. Complete Esperanto chapter from "World's Chief Languages". Gram. survey, vocabularies, etc.....	.25
WORLD'S CHIEF LANGUAGES , Prof. Mario A. Pei. A guide and survey of languages of entire world, incl. Esperanto. Maps, glossary, index. 663 pp.....	Cloth 6.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY , Karl Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. Offset edition in paper covers. 80 pp.....	.25
EDINBURGH DICTIONARY . Esp-Eng & Eng-Esp. Excellent and complete, in concise form. The very best small dictionary for English speakers. 288 pp.....	Cloth .85
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY . Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj de la Lingva Komitato". Complete, 490 pp.....	Cloth 2.50
FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY . Incl. proper names and neologisms. Each meaning listed separately. Complete, 348 pp.....	Cloth 2.35
PLENA VORTARO DE ESPERANTO , Grosjean-Maupin. Esp-Esp. The large complete all-Esperanto dictionary. Authoritative. 511 pp. Offset edition.....	Cloth 4.00
Rare, exactly same as above, but better paper & binding. Deluxe ed.....	Cloth 6.50
FUNDAMENTA KRESTOMATIO , Zamenhof & others. Authoritative chrestomathy and literary guide. Innumerable model stories, poems, etc. 472 pp.....	Paper 1.65
Latest edition, exactly same as above, but newly bound in boards.....	Half-Cloth 2.50
KARLO , Edmond Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo as he grew from boyhood to young manhood and marriage. 43 pp...	.25
THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio) . The best "Reader". Beautifully printed. Bound in blue, art vellum, 8vo, latest ed. on excel. Bible paper. 996 pp....	Cloth 2.50
ESPERANTO SORTIMENTO . Five books, good reading at low cost: <i>Akrobato de Nia Sinjorino</i> , legend of France, 25 pp; <i>Blanche-Virgulino de Lille</i> , medieval romance, 42 pp; <i>Lando de Argenta Akvo</i> , story of Far West, 48 pp; <i>Miserere</i> , music story, & <i>Thais</i> , by Anatole France (2 bks in 1), 66 pp; <i>Rozujo Ciumiljara</i> , the miracle of love, 48 pp. Each book 25¢. Entire sortimento for only.....	1.00
RARE COLLECTION OF 25 ESPERANTO KEYS . Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japana, Malaja, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Rusa, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Contains several rare items. Most complete collection...	2.75
INDIAN BEAD STAR . Genuine "Kiowa" work, tiny Indian beads on fine buckskin, round white ground with green star, beautiful rare art piece, 1 1/4" dia., brooch..	1.00
GREEN STAR PENDANT . Round white ground with green star on both sides of pendant, nickel trim, eyelet & 1 link, for necklace or watch-chain, 1 1/16" dia....	.75
ENAMEL GREEN STAR . Round white ground, gold trim, 7/16", button or brooch..	.65
On pentagonal white ground, with an E, gold trim, 7/16" dia., button or brooch...	.65
On star-shape ground, with E, white edge, gold trim, 10/16", button or brooch....	.65
On round white ground, gold trim, 1/4" dia. (small), with 2" pin, tie-pin only.....	.65

Esperanto, 114 W.16 St., New York 11, N.Y.

NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of *Doris Tappan Connor*. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. NOW, you can learn Esperanto like a "native"—*better, quicker, and easier*. It's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "*Connor Course*" is compiled by experts. "*Vinylite*" recordings by Mr. and Mrs. Connor. All designed so you can *master* Esperanto.



- The complete "*Connor Course*" includes the following:
- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
 - (2) Eight complete "*Vinylite*" double-sided 10" records.
 - (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
 - (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
 - (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
 - (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
 - (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "*Connor Course*", as described above, will be sent postpaid for *only \$36*.

FOR GROUP STUDY: Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays *only \$6 more* for Textbook and complete Study Guide for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order **NOW**:

Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.